
# *Monda Tago de la Abeloj*




**Celebra FAO Día Mundial de las Abejas/PL**

La organizo de UN por nutrado (FAO) celebras hodia? la  Mondan Tagon de la Abeloj kun la celo konsciigi la homojn pri la graveco de tiu ?i speco por la homa vivo.

Abelo, komuna nomo de iuj el la insektoj,   konsistigas superfamilion de la ordo, al kiu apartenas anka? vespoj kaj formikoj.  En la mondo ekzistas  ?irka? 20.000 specioj, de etaj formoj je nur 2 mm de longo ?is grandaj insektoj ?is 4 cm.

Kiel vespoj, plej multaj inaj abeloj havas funkciajn pikilon. Ili prezentas pikilon rektan  kaj provizitajn per mikroskopaj etdentoj tiel ke, kiam ili enkondukas ?in en sian predon, ?i restas forte ankrita al la korpo de ilia viktimo.

Provante forigi ?in, la abelo ?iras parton de la abdomeno kaj mortas balda?. Male al vespoj, ili tamen dependas de poleno por proteino kaj flora nektaro por energio.

Plenkreskaj inoj kolektas polenon ?efe por nutri siajn larvojn, kvankam plenkreskuloj anka? man?as ?in kaj nektaron. La korpo estas kutime tre harplena; adapto al kolektado de poleno.

Multaj abeloj havas grupojn de haroj sur siaj malanta?aj kruroj, kiuj formas specon de korbo, per kiu ili helpas kolekti polenon, kiu estas deponita tra la korpo. Aliaj abeloj portas polenon en grupo de haroj situantaj en la suba ventro.

La poleno, kiun ili neeviteble perdas dum irado de floro en floro, gravas por plantoj, ?ar parto de ?i falas sur la pistilojn de aliaj samspecaj floroj, produktante krucpolenadon. Abeloj estas la ?efaj polenantaj insektoj. Tial, protekti abelojn estas maniero anka? prizorgi nian vivmedion.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/ciencias/257972-monda-tago-de-la-abeloj

Radio Habana Cuba